La karavano al Ještěd kaj Liberec havis trankvilan sortaron, kvankam ĝi ne estis malpli interesa. La distanco estis multe malpli granda, tial mankis ĉia hastado, ĉie restis sufiĉe da tempo. Jam je post la 10a h venis la ekskursantoj al Ještěd, de kie ili admiris la ravan ĉirkaŭrigardon, ĉitage pro iom nebuleca vetero malpli klaran. Tagmanĝo sur ještěd estis tre bona kaj post ĝi oni havis tempon pli ol 1 horon sunumi sin aŭ malrapide piede descendi al la malsupre atendanta aŭtobuso. reston de la tago oni pasigis komforte en la zoologia ĝardeno kaj per promenoj tra la arbaroj kaj vilaaj kvartaloj de Liberec. La vespermanĝo en hotelo Zlatý lev estis modelo de tio, kion oni al si prezentas sub vere ekzempla gastoservo. Ni estis rapide kaj bonege priservitaj en aparta salono kaj esprimis ankaŭ nian dankon al la gvidanto kaj personaro de tiu ĉi modela entrepreno.

Dum reveno eksonis gaje la kantado en la aŭtobuso kaj onin trapenetris sento de feliĉo pro ĝue pasigataj momentoj. Preskaŭ oni bedaŭris devante forlasi je la 21a h la aŭtobuson.

Jiří Kořínek

DU FORĜISTOJ

/Dva kováři v městě.../

Loĝas en urbeto pace en kvieto
du forĝistoj sur la plac'
unu huf-ferumas
dua amindumas,
Anjon el bien' sen lac'.

Venis el vilaĝo,
venis la mesaĝo
de la vokta solfilin',
ke ŝi ne malemus,
se mi al ŝi venus
kaj brakumus arde ŝin.

Luno hele brilis
kaj mi amsopiris
sur la voj' al amatin',
luno brilis hele
nokte surĉiele,
kvazaŭ ĝi komprenus min.

Fil' pripensu bone
antaŭ ol senkone
iĝi al virino sklav',
ĉar ne ĉiam beno
ino el bieno
estas, kiam pasos rav'.

Tradukis Jiří Kořínek

La konscienco

La redaktoro de iu gazeto aĉetis kilogramon da sukero. Sed hejme li rimarkis, ke inter la sukero estas kreto-pulvoro. Pro tio li tre koleris kaj metis en ĵurnalo jenan anoncon: „Hodiaŭ mi aĉetis

kilogramon da sukero, sed ĝi enhavis preskaŭ duonan kilogramon da kreto-pulvoro. Se la komercanto, kiu vendis al mi tiun sukeron, ne tuj sendos al mi funton da pura sukero, sen kia ajn almiksaĵo, mi morgaŭ publikigos lian nomon.“

La saman vesperon li ricevis de kvin vendistoj po duona kilogramo da sukero!

En danĝero

Kuracisto akceptas telefonan alvokon. Patro sciigas, ke lia fileto englutis fontplumon.

„Mi tuj venos!“ respondis la kuracisto. „Kion vi dume faras?“

Patro: „Mi skribas per mia simpla plumo.“

Raŭkeco

Ĝi estas simptoma de malsaniĝo de la gorĝo, kaŭzita ĉu per inflamo, per laciĝo de parolado, per mervozeco, per pulmo-malsano aŭ per formiĝi de absceso en la gorĝo. Se la kaŭzanta malsano ne estas danĝeraspeca, la raŭkeco baldaŭ malaperos; ĉe profunde enradikiĝinta malsano ĝi estas longedaŭra. Ĉiu unu – aŭ duhore gargado de la buŝo kaj nazo per citronakvo de 20°, nokte ĉirkaŭkolaj kompresoj, ĝenerala kurac-flegado de l'korpo laŭ naturo de l'kaŭzanta malsaneco.

NOVAĴOJ

Hodiaŭ estas mardo 5-8-1952. Vetero: výborné počasí až do konce týdne zaručeně potrvá!

Dnes večer lampiónová slavnost na jezeře. Začátek ve 20 hod. Účinkují dvě hudby. Zakupte si včas v naší prodejně lampióny a svíčky a zajistěte si lod'ky. Po programu tanec.

Věnujte pozornost fotografiím koleje a ještě dnes si objednejte patřičný počet jednotlivých druhů!

KLAĈEMA OBSERVANTO

Samideán Kořínek je velice silný člověk. Dokázal postavit na hlavu celou historii esperanta, když ve středu prohlásil v kursu D, že již r. 1990 vyšla první česká učebnice esperanta. Gratulujeme!

Ještě silnější je však s-án Kožený. V úterý na pláži pokusilo se 6 zvláště vybraných dobrovolníků dokázat i násilím, že jmenovaný se vody nebojí. S. Kožený mimo pohmožděniny lehčího rázu utrpěl několik těžších zranění, kterým dosud nepodehl. Dokázal však, že jeho náramná síla vzbuzuje obdiv!

Hanako si přichází na své ve stravovně n.p. Delta. Bylo s podivem dívat se na kvanta, jež pomalu, ale jistě mizí v jeho útrokách. Na dotaz o svém tělesném zdraví prohlásil, že by kursisté viděli, kdyby se nestyděl. . . Jedná skutečně samideánsky, jestliže popřeje i žaludkům druhých krmě vydatné!

Stěžoval si mně náš podnikový kouzelník LI, s nímž mám tu čest v Doksech spolubydleti, že mu dosud neuschly jeho vlněné plavky a mé jsou naprosto suché. Koupali jsme se přece současně. . . ? Ano, dějí se věci, které nejsou tak lehké k chápání! V tom však nejsou žádné čáry! Známe přece výbornou povahu s. Špůra, od něhož si plavky vypůjčíme (abychom zbytečně netrhali své!) a na odív vystrkujeme opět vždy své!

Důvěřivost některých, zejména vzdálenějších členů koleje je nesmírná. Samideánka ve smyslu pro pořádek si na př. nechá na pláži uschnout plavky, aby si příští odpoledne opět suché oblekla. Velmi se divila, že někdo znalý poměrů vzal plavky do úschovy a dosud se nepřihlásil!

Při pondělním obědě byl značný výprask nad kvalitou podávaného jídla. Byli i takoví samideáni, kteří ve snaze po uchování zdraví odešli, aby holdovali mléku a "tyčinkám"

nesmírně křehkým, vydávající "všanc" svých posledních několik dosud nevyndavacích zubů. Úděl však vzbudila zpráva, že se vydává vepřové. Po zachování paniky a patřičném rumu na stravovnu každý byl obsloužen, aby mohl ukojiti svůj hámiždný hladový chtíč vepřovým nebo uzeným!

Nie je pravdou, že časť samideanov z Bratislavy si zmýlila cestu na Bezděz pre silný obsah flaše „starorežnej“, ale je pravdou to, že si vybrali cestu pohodlnejšiu, aby nemuseli tak často siahnuť za obsahy spomenutej flaše. Kto neverí, nech sa opýta pána, ktorý bol ešte donedávna šťastným majiteľom starorežnej.

Přihlásí se muž, který ještě o 23. hodině pobíhal po pláži s víškem v ústech vlivem tučné večeře?

Zn.: "Lepší osvědčený prostředek"

Loĝejo de niaj Ĉe-instruistoj similas al ŝipa kajuto kaj antaŭĉambro al ferdeko. Komplika farigas la malgrandeco de la ejo matene. Kiam unu sin vestas, la alia dume devas eliri sur ferdekon, ke la alia sin povu vesti.

Redakční uzávěrka vždy v 11 hodin. Vhodné příspěvky se po zásluze odměňují z vlastních prostředků redaktaro. Občas přispívá také kolej. Toto číslo vychází jako dvojčíslo.

Vysázeno v úterý, v 7.30 hodin.

Verda Voĉo de Doksy

INFORMATIVNÍ, POUČNÝ A ZÁBAVNÝ OBĚŽNÍK LETNÍ KOLEJE ESPERANTA V DOKSECH
INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

No. 7

7-8-1952

Jak se učít

Prvním předpokladem úspěchu při učení je vědět, proč se učíme. Mějte zájem! Učit se řeči, to nemá být dřina, ale radost. Dává možnost rozhovoru s jinými vzdělanými lidmi, usnadňuje cestování, dává lepší kvalifikaci, uznání u svého okolí. Chtějte! Kde je chtění, tam jsou i možnosti. Učte se v celcích! Máme-li před sebou stále celkový přehled, snadněji pronikneme k jádru věci. Učte se s plnou soustředěností anebo toho raději nechte.

Rozptýlené a polovičaté učení vyčerpává a nepřináší ani třetinu užitku jako učení soustředěné při stejné námaze.

Bylo by škoda, abyste čas věnovaný Esperantu v Doksech promarnili tím, že po návratu domů odhodíte všechny knihy, sešity a ostatní pomůcky do kouta a necháte je tam bez povšimnutí ležet.

- S.

S O P I R O

Mi kial vivu en sopir'?

Ja nur al vi nun celas mia sento
Kaj ĉiu penso kaj sopir' je belo,
Al vi donita de la maja vento.

La oraj haroj, la okul' azura,
la dolĉa rid'ĉielon promesanta –
vin vidas la anim' en bildo pura.

Nur pri konsol' sopiras brula koro,
vin eble trovos mia peta vorto –
mi antaŭ vi genuas en adoro.

Aŭ – ĉu eterne nur sopir'?

G. P. Bavorovský – elĉeĥigis E. Suchardová

LETNÍ KOLEJ ESPERANTA V -DOKSECH

(Somera kolegio de Esperanto en Doksy)

27. 7. - 9-8. 1952.

pořádá tyto kursy a přednášky:

A1 A2 kursy pro začátečníky. Vyučují metodou přímou (Ĉe-metodou): K. Šolc, Slanina, Eva Suchardová. Jejich přednášky systematicky doplňují: R. Hromada (úvod do esperanta), M. Seppová (16 pravidel základ. esper. gramatiky Dra Zamenhova), V. Špŭr (zpěv původ. a přelož. esper. písní). Třídní K. Šolc, A. Slanina.

B1 B2 kursy pro pokročilé . Vyučují: 1. Opakování esper. gramatiky - J. Kožený . 2. Lehká konverzace: J. Friedrich, R. Hromada, M. Seppová, K. Šolc, V. Špŭr, J. Vítek. 3. Úvod do esperanta - R. Hromada. Třídní: J. Friedrich, R. Hromada.

C k u r s k o n v e r s a č n í : 1. Úvod do esperanta - R. Hromada. 2. Prohlubování znalosti esper. gramatiky - J. Kožený. 3. Těžší konverzace: - J. Friedrich, V. Špŭr, J. Vítek. 4. Řečnická cvičení - A. Slanina. Třídní J. Vítek.

Esperantský seminář. Přednášejí:

A) Dr A. Pitlík (Historio de la ideo pri la universala lingvo, Historio de internacia esp. movado, Esperanta literaturo traduka kaj originala), R. Hromada (Dr Zamenhof kiel homo, Esperanto ĉe la ĉeĥoj kaj slovakoj, Arto verki kaj traduki en esperanto), J. Kořínek (Renesanco de esperantismo, Instruo el la leteroj de Dro Zamenhof, Literaturaj observoj, Esperanta poezio en Ĉeĥoslovakio, Reguloj de esperanta fonetiko, Pri la gramatika karaktero de radikoj en esperanto, Reguloj de vortfarado en esperanto, Pri la esperanta poetiko, Pri la traduko de muzikaj tekstoj, La problemo de neologismoj en esperanto), J. Kožený (Problémy esp. mluvnice, Zamenhofův život, Zamenhofovo jazykové a literární dílo, Esperanto s hlediska Marx-Leninského názoru na jazykovědu),

B) v cyklu přednášek zvláštních: V. Borská (O zpěvnosti esperanta), K. Píč (Esperanto, ĝiaj evoluo kaj vivo).

C) kursy čtení a psaní r u š t i n y - J. Kožený.

Pi

-jelč- Valečov a přifařené okolí očima účastníka.

Výhodná nabídka koleje, která již v prospektu upoutala pozornost všech, skutečně vylákala velkou většinu účastníků letních kursů k účasti, i když přílišné parno již předem kladlo na účastníka určitou turistickou vyspělost. Oběd ve Sportu byl podáván ve vší tichosti a bez náležitého rum. na obsluhující personál, čímž značně utrpěl jeho svéráz. Avšak postupně se tváře obědvajících zachmuřovaly a přejímaly i vyděšený výraz, který přecházel do letargie. Důvodem byl nácvik melodie asi velmi nepřístupné. Mnozí samideáni přemýšlením o možnostech demolování klavíru nebo zpěváků otupili svůj ostrovtip, že během výletu měli zájem jen o tekuté potřeby žaludku, o krásy přírody se všemi ostatními zážitky jim unikaly

jakoby samozřejmě.

Vždyť už organisovaný chaos při obsazování míst v obou přesně dojevných autobusech je zaznamenání hodný. Rovněž nestává se často, aby v posledních okamžicích dobíhali samideáni finišem zcela po vzoru Zátokově.

Po patřičných poučeních vedoucího výpravy s. Šolce a několika dodatečných s. Slaniny autobusy odstartovaly, aby 110 obětavců odvezly pod zříceniny Valečova, které je neméně zajímavé jako ovoce po cestě. I pěší túra měla svou hezkou bilanci – dva vypité hostinské podniky. Ba ve druhém málem by došlo i na zásobu užitkové vody ve vanách před hostincem, čemuž zabránilo jen důrazné vysvětlení jedné z ubytovaných rekreantek.

A opět pochod za veselého halekání, výstup, sestup, bloudění, lamentování i opěvování krás přírody, prostě se vším, co patří k normální turistice.

A když potom se schylovalo k večeru a vyčerpány byly veškeré zásoby chlebníků a aktovek, bylo hovoru mnoho, ba i se strany vedoucích, kteří svými znamenitými hlasovými orgány i výřečností se snažili přesvědčit účastníky o nutnosti být včas doma. Program byl splněn a vedení výletu uspokojeno i za cenu jednohodinového zpoždění. Vydatná večere, úprk do ubytovacích prostorů s plnými žaludky, očištění těla, to vše bylo otázkou už jen nejkratší doby a nejjednodušší umělecký večer byl věru nejkrásnějším zakončením dne.

Al novaj Esperanto-instruistoj!

Jen kelkaj bonaj konsiloj por via laboro poresperanta aŭtune 1952.

Por ekinteresiĝi pri esperanto kaj altiri al lernado de la lingvo verbumadu unue tiujn sociajn tavolojn, kiuj jam havas aŭ montris ian inklinon al la internacia lingvo esperanto. Hodiaŭ ili estas troveblaj precipe inter laboranta popolo aŭ studentaro. Tio signifas, ke al tiu funda celo adaptiĝas al formo de nia informado por la aŭtuna kampanjo.

Antaŭ novaj kursoj minimume ... tagojn informu la publikon per sufiĉe granda nombro de afiŝoj, flugfolioj, gazetaj artikoloj, publika parolado, bone aranĝita esperanto-ekspozicio en iu elmontra fenestro en bone frekventata strato, kaj ĉefe ankaŭ buŝe.

Bona afiŝo devas ne nur atentigi pri la ekzisto de esperanto, sed altiri al nia afero tiujn, kiuj ĝin rimarkis.

La enhavon de la flugfolioj de informado oni devas studi por ne maltrafi la celon.

En la ekspozicio ne estu uzataj malnovaj afiŝoj, precipe paliĝintaj eĉ makulitaj, sensignifaj libretoj aŭ polvaj gazetoj el la tempo antaŭ la unua mondmilito. Ankaŭ la poŝtkartoj devas esti altiraj kaj interesaj. La informado per la buŝo estas la plej bona, sed ĝi devas esti farata honeste kaj ne eblas paroli pri granda facileco de esperanto, sed ... ke oni lernas nacian lingvon 8 jarojn kaj pli, sed internacian lingvon esperanto oni povas ellerni dum multe pli mallonga tempo, ĉar ĝi estas simpla kaj facila.

Nomu la lingvon nur esperanto aŭ internacia lingvo, ne uzu superflajn epitetojn kiel ekz. helpa, arta, artefarita aŭ dua k.t.p. Tio igas konfuzon kaj ne bonan opinionon.

Esperanto estas fakte internacia lingvo laŭ sia strukturo, laŭ sia celo kaj laŭ sia praktika apliko.

Inter la neinformita publiko ne parolu pri aliaj projektoj aŭ projektetoj. Ne diskutu kun mortnaskitoj, tio ne havas sencon!

Memoru, ke ĉia ajn bruo pri esperanto certe iun altiros, sed memoru ankaŭ tion, ke de la kvalito de la bruo dependas la kvalito de la estontaj esperantistoj.

Fr. Pytloun

Příští p o s l e d n í číslo vyjde v sobotu jako dvojčíslo.

NOVAĴOJ

Hodiaŭ estas ĵaŭdo 7-8-1952.

Vetero: podmračno, sklon k preháňkám. Příroda tak vyjadřuje svůj žal nad blížícím se ukončením kursů letní koleje.

Programo: hodiaŭ akademio de kolegiaj frekventantoj. Komenco je la 20a h en "Zátiší".

- vendreda karnavalo - nunjare en la restoracio de Bezděz! Forveturoj de aŭtobuso laŭ specialaj anoncoj en resp. klasoj.

KLAĈEMA OBSERVARTO

Večer u Máchova jezera.

Nadešel večer, krev potila mračna,
poslední slunka zář ssála země lačná.

Země tak voněla jak hebké vlasy děvy,
ze šumného boru jsi slyšel zpěvy stery.

Oči tvé pokryla hebounká pára a slyšela
jak vlnka vlnu šepotem kárá:

Jen tišeni, jemně, kdo šel by mino

Vy slyšel neznámých zvuků pianissimo

Cítíš krásu a mezitím co srdce směje se a skáče
jako tvé se kalí a dojetím pláče:

Spi sladce zemi opěvaná -

Máchova "zemi krásná a milovaná"!

F.J.Kub.

(Píseň zamilovaného a nevyslyšeného
nebo pláč nad rozchodem...? pozn.red.)

K příjemnostem v Doksech patří beze sporu hodiny. Nevěříte? To tedy nebydlíte v noclehárně MNV. Jdete vesele domů, roztáhnete své zemdlené ůdy na posteli, blahořečíte jejímu vynálezci a hodiny vám hned zkazí náladu. Máme totiž umístěny dva tyto přístroje hned vedle našeho útočiště. Jak se báječně doplňují. Bijí každé čtvrt hodiny a protože ne současně tak celou noc posloucháme tóny této něžné ukolébavky vždy po pěti minutách!
(To je divné-hodiny zde kdy bijí každých 10 minut-pozn.saz.)

Redakci:

Díky Vašemu blahopřání Boženkám a Martám rychle psal samideán své manželce 29.m.m.večer:

- Doksy 27.7-1952. K Tvému milému svátečku vše nejlepší Loiza-Pak ještě dodal: -Tak již jsme tady tři dny, hrozně to utíká!-

Pri včerajšom výlete na Valečov jeden zo samideánov prejavoval radosť nad krásami kaštiela mimoriadnym spôsobom. Rozrubal stôl vlastným telom pred očami druhých, ktorí len nemo prizerali. Druhý udivil svojím spevom tak krásnym, že mu redakcia odovzdáva dve ponuky k sňatku, hoci je jasné, že ho doma očakáva početná rodinka, ktorá len s ozajstným finančným vypätím mu umožnila zájazd do Doks. Redakcia ani vedenie koleje nepreberá zodpovednosť za tieto lahkovážne počiny.

Včerejší výlet však ukázal i veľkou dobrosrdečnosť četných samideánů. Bylo dojemné vzájemné obdarovávaní ovocem, byť i nevyzrálým, různými nápoji, když v obou hostincích pramen při organisovaném chaosu rychle vyschl. Ba někteří nabízeli dokonce i části svého vlastního oblečení, což při poměrném parnu bylo opravdu již přeháněním ctností pravého esperantisty.

Lampiónový večer si vyžádal mimo více objetí vlivem idylické nálady i jednu oběť. Snaživý samideán ve snaze přiblížit se pokynům pořadatelstva zcela náhodně dokázal, že při břehu přístaviště loděk je značná hloubka. V blízkosti službu mající samideáni v posledním okamžiku vytáhli uvedeného a zavedením umělého dýchání ho vrátili životu. Teprve potom bylo v ústraní přikročeno k řádnému vyždímání jeho obleku a prádla. Samideán žije a těší se poměrnému zdraví!

Redakční uzávěrka vždy v 11 hodin. Vhodné příspěvky se odměňují! Sledujte život koleje a zajímavosti pošlete redakci! Zajímá to všechny.

Vysázeno ve čtvrtek v 7,15 hodin.

Verda Voĉo de Doksy

INFORMATIVNÍ, POUČNÝ A ZÁBAVNÝ OBĚŽNÍK LETNÍ KOLEJE ESPERANTA V DOKSECH
INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

No. 8-9

9-8-1952

A D I A Ŭ ?

Ĉu vere adiaŭ? Ĉu vere esperantistoj adiaŭas? Ne, nia saluto estas „Ĝis la revido!“ Kaj tiu ĉi saluto nin kunligas, ni denove renkontiĝos, ĉu en la venonta kolegio, ĉu en niaj regionaj kunvenoj. Ni, esperantistoj, ne laciĝas, ni fosas persiste nian sulkon por atingo de nia celo. Kaj tiu celo estas „La paco kaj internacia interkompreniĝo“. Kaj ankaŭ vi, la novaj esperantistoj, venintaj en niajn vicojn, restos certe fidelaj al nia movado, al nia devizo „Ekregu la paco en la mondo“!

Al vi ĉiuj ni diras ne „Adiaŭ!“ sed „Ĝis la revido!“

A.S.

Akceptu de mi, sinjoro ...

Akceptu jen de mi, sinjoro,
iom da pensoj pri dolĉa teren',
akceptu spiron de papava floro,
timeman bildkarton super la ter'.

Ne legu, karulo, konfeson krudan,
ne legu pri ploro kaj pri dolor',
Ne volu kompreni la peton mutan,
nek ŝiri la floron de ruĝa kolor'.

Akceptu nur de mi, sinjoro,
mallaŭtajn vortojn pri la sopir',
akceptu senton sen pretenda koro,
al kiu ordonas via dezir'.

Ne pensu al mi, kara kaj fora,
kaj se vi sopiros, do nur al vento, -
Ĝi vin karesu en horo angora,
neniam rakontu pri vana sento.

Eva Suchardová

Kroniko

Lunde trapaŝante la klasojn ni ĉie konstatas belan rezulton de unusemajne diligenta studado. En klaso A1 la kronikisto fariĝis atestanto de gaja sceneto, la ŝerca parodio pri geedziĝa ceremonio: La ĉarma juna samideanino Svobodová, fianĉine vestita, la komike vestita fianĉo s-ano Vimr estis de pastron rolanta s-ano Jeřábek geedzigataj. Gajo kaj sprito rikoltis multan ridon.

En kurson D allogis multajn gastojn operkantistino s-anino Borská, kiu prelegis pri taŭgeco de esperanto por kantado. Precipe montroj de kelkaj kantoj de Schubert, Brahms, Fibich k.a. en esperanto rikoltis merititan aplaŭdon. Same ĉiujn aŭskultantojn igis aplaŭde montri kontenton deklamo de kelkaj poemoj tradukitaj kaj originalaj. Recitis parkere s-aninoj Borská, Svozilová, Novotná kaj Podhradská.

Vespero alportis surprizon en Zátíší. „Amika vespero kun programo“ sed kia programo! La juna samideano d-ro Pravoslav Sádlo, virtuozo sur violonĉelo, ludis al ni Rokokajn Variaciojn de Ĉajkovskij kaj preludon de Eccles. En laj vera artisma ĝuo, kaj la rondo de la kolegianoj sentis sin honorata de la arta artodono de nia emeineta samideano. Ion similan apenaŭ la salono en Zátíší iam aŭdis. Aplauĝego ne sufiĉe povis esprimi dankemon al nia popola kaj modesta majstro. En plua, jam pli popoleca programo, s-ano Hrabý el Hradec Králové, la spritega elegantaspekta konferisto, voĉimitanto, per siaj gajaj scenetoj kaj anekdotoj ridigis la plenplenan ĉambregon. Bele kantis al ni s-anino Zemanová, tre bonnivela montriĝis la gitara duo Ploc-Březina. Sian ĵus komponitan kanzonon ĉeĥlingvan pri esperanto prezentis s-ano Vimr el Louny. Sur buŝharmoniko koncertis s-ano Jeřábek. Tra varma aroma somera nokto kun sorĉimpresa ora disko de plenluno sur la ĉielo revenadis la kontentaj ĉeestintoj hejmen.

Marda tago per sia sunvarma vetero ree ellogis ĉiujn al la lago. Kaj vespere okazis do la streĉe atendata, tradicia lampiona vespero sur la lago de Mácha. Dank' al enorma oferemo de s-ano Špŭr, kiu foroferis preskaŭ du tagojn kaj devis rezigni la dimanĉan ekskurson por perĉasi ie post Prago materialon por artfajraĵo kaj la piroteknikiston, ni havis vere fabelan spektaklon. Dum la raketoj kaj petardoj knale saltadis elĉielen, dekoj da kandeloj ornamitaj per lumentaj buntaj lampionoj kaj bengalaj torĉoj remijon dise, jen en kunkroĉiĝintaj serpentumantaj vicegoj kaj cirkloj sur la nigra surfaco de la lago. Du lampionornamitajn motorŝipojn suriris tiuj, per kiuj ne restis boatoj. Sur la ŝipoj promennavigantaj ludis kapeloj kaj operkantistino Věra Borská kante sonigis en la ravan someran nokton simbolajn kantojn kaj oper-ariojn. La bildo fariĝis perfekte sorĉoplena, ja preskaŭ nekredibla, kiam tra bizaraj nubĉifonoj naĝis la plenluno, alkantata per melodio el Najado de Dvořák: „Ho luno sur alta ĉiel“! Kaj ree kaskadoj de arĝenta lumego sur la bordo, gajaj renkontiĝoj de la boatoj. Centoj da gastoj observis la maloftan vidaĵon de sur la bordo, kie dume koncertis muzikistarto. Kaj kiam la boatoj unu post la alia revenadis borden, miksiĝis la kontentaj samideanoj al la dancantoj. Ĝis la unua horo postnoktomeza sonis la bordo kaj en malfrua nokto revenadis la paroj kaj grupetoj ĝojaj hejmen.

Merkredo preparis du eventojn. Unua el ili, la ekskurso al Valečov kaj Mišský per du aŭtobusoj en la varmega tago ŝajnis komence grumbliĝi kelkiuj ŝvitgutojn, precipe kiam oni devis rimarkeble ascendi. Sed baldaŭ la bela elvidejo kaj agrabla paŝado tra rokfendoj kaj sur ombraj arbaraj vojetoj kun verda fiodoro iome forgesigis sopirojn je nia lago, kaj ĉiuj fine komputo kaj maĝavide elsvarmis el la aŭtobusoj antaŭ la manĝejo Delta.

La vespero estis evento unuaranĝa. Vespero de vera kaj alta arto, pri kiu povus plene fieri eĉ Universala Mondkongreso de Esperanto. En la salonego de la Kultur-domo donis al ni la plej bonaj el ni la plej bonan. El Peer Gynt de H. Ibsen, tradukita tiel brile de E. A. Haŭgen ni vidis la plej ŝercan 3an scenon el la 3a akto. Brile donita estis la rolo de Solvejg de s-anino Eva Suchardová kaj tre bona estis Peet de d-ro Jar. Sucharda (estis nekredible, ke nur antaŭ 3 tagoj ili ekstudis la rolojn!). Bonega kaj konvinka estis la Verde Vestita Virino de Věra Borská. Věrka Podhradská rolis la idon. La kanton de Solveig de E. Grieg kantis Věra Borská. La sceno, samkiel la ceteraj senkulisa, per la perfekta prezento impresis plene fike kaj rikoltis longan aplaŭdon.

Kaj poste nia virtuozo sur violonĉelo s-ano d-ro Pravoslav Sádlo katenis ĉies atenton per la plej rava violonĉela koncerto, la H-minora de Ant. Dvořák. La dono estis simple superba. Penetris ĝis

korprofundo la tonoj de la belega verko. Ho, kiel kantis mole la dua frazo kaj kiel brilis la malfacilega tria. Laŭdegon al vi, majstro, kaj dankegon! La pianan akompanion de tiu ĉi koncerta grandkomponaĵo havis s-anino Hanušová, kaj ni estis konsternitaj per ŝia elstara, eksterordinara ludo. Estis por ni ĝuo kaj surprizo arto ne sufiĉe aprezebla.

S-anino Věra Borská per sia bela alto kantis al ni „Ave Maria“ de Fr. Schubert en traduko de R. Hromada. Kaj jam ni ekvidis unuaktaĵon de d-ro Jar. Sucharda: „Mi revas pri vi Jean Baptist“ en kiu montriĝis denove Eva Suchardová, granda artistino, perfekta aktorino kaj konforme bonege ludis d-ro Jar.. Sucharda, kiu prezentiĝas kiel talenta dramverkisto.

La brilan, amikan vesperon, sen trigo, fermis la unuaktaĵo de Julio ... „Granda Ludo“ speciale por ĉeĥaj esperantistoj verkita. Tiu spritplena okulfrape montris la rarajn kapablojn de Eva Suchardová. Ŝia rol..... tis absolute perfekta kaj konvinka, ŝia lingvo modela. D-ro Jar. Sucharda tie povis same multon montri el sia arto. Muzikajn interludojn kaj akompanion havis s-anino Hanušová.

Estis vespero, kiun oni dum jaroj ne forgesas!

Ĵaŭda vespero fariĝis denove edifa okazintaĵo. Solena artvespero ĝi titoliĝis kaj ĝia etoso estis solena kaj ĝia programo altgrade artisma. En ĝi kulminis ĉio bela, kion ni dum la kulturaj vespero de SKED aŭdis kaj ĝuis. Mi ripetas: pro tia programo devus fieri mondkongreso.

La kursanoj aperintaj en plena nombro post enkondukaj kaj salutaj vortoj de s-ano Slanina ekkantis La Esperon. Kaj jam sur la podio grupiĝis la gea ĥoro de lernantoj por prezenti kelkajn kantojn de plurnacia deveno. La unua estis la originala esp. kanto „La verda Stelo“, sekvis la freŝmelodia Transvala kanto „San Marejs“ kaj la slovaka kanto Se la kor' suferas en traduko de St. Seeman kaj ĉeĥa popolkanto „Du forĝistoj“ en traduko de J. Kořínek. Finis la bela pola kanto „Montano“. La ĥoro prezentiĝis kiel perfekta kolektivo, kiu ĉe pli abunda tempo por ekzercado donus imponan plurvoĉan ĥor-korpuson. La elstara ĥorestra talento, oferemo kaj ĉarma energieco de la plej juna instruantino, s-anino Magda Seppová havas la grandan meriton pri la sukceso de la ĥoro.

Nia admirata gasto s-ano d-ro Pravoslav Sádlo, la fama violonĉela virtuozo, kiu nin jam ravegis dum du pasintaj vesperoj, prezentis nun „Valson“ de Řídký kaj „Rondon“ de Dvořák. Estis ekstrema ĝuo aŭdi kanti la instrumenton sub liaj majstraj fingroj. Precipe la Rondo estis ebriiga belo.

Sekvis sinsekvo nomita: „Amo en kanto kaj poezio“. Du majstrinoj de sia fako la dramatistino Eva Suchardová kaj operkantistino Věra Borská sciis forsendi nin en revolandon de amo. En modela deklammaniero, kian oni antaŭ apero de Suchardová ĉe ni apenaŭ aŭdis, ni sorbis la vortojn de poemoj de Fráňa Šrámek „Kluzo“, „Virino kaj unika vir“ de Sládek, „Ĝi longe for“ en majstra traduko de R. Hromada kaj originalan poemon de Kurzens „Senti vin“

La bela aldo de Věra Borská sonore kaj trasentite kantis intermite „..... ton“ kaj „Serenadon“ de Brahms en tradukoj de Jiří Kořínek, kantoj de Richard Strauss „En la Postvesper“ kaj „Mi portas mian amon“ kaj belan kanton de Hugo Wolf „Ĝardenisto“, kiujn tradukis d-ro Tomáš Pumpr. Esti ... surprizo ĉi tiu kunlaboro de majstraj poetinodeklamantino kaj rekonata operkantistino. Aŭdi ion similan oni povas tre, tre maloftege.

Plej juna lernanto s-ano Valjan pianludis „Enterigon de la pupo“ de Ĉajkovskij. La lingvospertaj niaj du 12-jarulinoj el Brno V. Podhradská kaj J. Novotná ĉarmis nin per en kostumoj prezentita gaja sceno de „Ukraina rakonto“.

Kiam la anoncanto, s-ano Slanina, konigis, ke nia ŝatata direktoro s-ano d-ro Pitlík ĵus jubileas sian 50-jaran esperantistecon, oni salutis lin per tondra aplaŭdo. La jubileanto per kortuŝitaj vortoj rakontis al ni pri sia esperantiĝo en 1902 kaj pri siaj feliĉegaj spertoj pri Esperanto dum la tuta vivo. Esperanto lin, venontjare 70- jarulon, tenas ĉiam sana kaj vivĝoja. Poste recitis unu el liaj poemoj „Na Máchově jezeře“ s-anoj Borská, Podhradská kaj Novotná.

S-ano Jeřábek, la fama Hanako, kiu jam ok jarojn fidele vizitas ĉiujn ...arojn de la Kolegio diris al ni kelkajn belajn kaj sincerajn vortojn. La vesperon finis la ĥoro de la kursanoj sub la gvido de s-anino M. Seppová, kiu kantis al ni rusan kanton de I. Dunajevský „Floras la viburno“ en traduko de J. Kořínek kaj la tradician „Tagiĝon“.

Dum ĉiuj muzikaj prezentadoj mirigis nin per sia artisma kaj unika fortepiana akompano s-anino Hanušová, pianistino de plej alta stilo.

Kiam la edifa programo finiĝis kaj foriris kelkaj el la samideanoj, tamen plejparto de ĉeestantoj ne kapablis adiaŭi de la salono de l'ĝuo aldonis la artistoj al la programo ankoraŭ kelkajn perlojn. Eva Suchardová deklamis ĉeĥlingve du poemojn de Vallo, poemon „Dopis“ de Anna Achmatová. Prezentiĝis al ni kiel lertega deklamanto prof. J. Kožený, kiu deklamnis poemon de V. Nezval „Adiaŭ kaj tuket“ en traduko de J. Kořínek kaj la saman poemon ĉeĥlingve en originalo. Sekvis de Vallo „Verše mé Janě“ kaj de N. Asějev „Letní dopis“. Majstro d-ro Pravoslav Sádlo ankoraŭ por adiaŭo sonigis sian violonĉelon en „Gavoto“ el suito de Bach kaj en sonato de Eccles. Tiom de belo, tiom da vera arto je unu fojo! Dankon por viaj unikaj art...oj, vi ĉiuj, kiuj kontribuis al la plej bela vespero.

Jiří Kořínek

Kulturní brigáda v Deltě

Esperantisté v Doksech uspořádali 7.8. kulturní brigádu pro zaměstnance podniku Delta. Byli velmi srdečně přivítáni a celá beseda trvající 90 minut uspokojila diváky i účinkující.

V první části besedy byl předveden vážnější kulturní program: hra na violončelo /sam. Sádlo/, zpěv /sam. Borská/, recitace /sam. Suchardová a Kožený/. V druhé části se diváci srdečně pobavili naslouchajíce Hurvínkovi, Špejblovi a Mániče, které roztomile předvedl sam. Hrubý. Rovněž hra na kytaru a zpěv mládeže působily v útulném prostředí srdečným dojmem. Náš známý veliký mág LI, sam. Rýznar, okouznil všechny diváky, zejména ženského pohlaví – kromě ostatních kouzel, která předvedl se svou obvyklou přesností. Beseda, kterou jsme začali hrou na největší nástroj – violončelo, jsme skončili hrou na nástroj nejmenší, téměř neviditelný – foukací harmoniku. Sam. Hanako věnoval toto své číslo přítomným kuchařkám, poněvadž prý – podle jeho prohlášení – ony jsou nositelkami všeho pozemského blaha.

Živě vedená konference našeho osvědčeného konferenciera sam. Slaniny spojovala zajímavě jednotlivá čísla programu a všichni účastníci – diváci i účinkující – se rozešli spokojeni sebou navzájem a s pocitem srdečného přátelství.

NOVAĴOJ

Kursy LKED 1952

Do kursů Letní koleje esperanta přihlásilo se letos 150 žáků, kteří navštěvují kursy A1, A2, B1, B2, C a seminář. Žactvu, jež se podrobuje v sobotu 9.8. písemným zkouškám pomocí testů, vydává se osvědčení o účasti a prospěchu.

Dr. Pitlík – 50 let esperantistou

Jako septimán gymnasia v Č. Budějovicích stal se v srpnu r. 1902 ředitel LKED esperantistou. Jeho význam v čsl. a světovém esper. hnutí byl vypsán ve VV již r. 1948 u příležitosti jeho 65. narozenin. V mezinárodní literární soutěži, pořádané u příležitosti XXXVII. Světového kongresu esperanta v těchto dnech v Oslu, získala žačka LKED esper. básnička Eli Urbanová II. místo za báseň „En arbaro“ a VIII. místo za báseň „Nimfoj“.

Letní kolej esperanta v Popradě.

Okresní osvětová beseda v Popradě uspořádá v rámci kulturního plánu měsíčně za spolupráce stálého přípravného výboru LKE v Doksech tyto esper. kursy: základní, pokračovací, konveršiční /spojený se seminářem/. Kursy budou zahájeny 10. srpna seznamovacím večerem. Konec kursů 23.8. zkušebními testy. Vyučují: J. Friedrich, K. Šolc, V. Špůr, E. V. Tvarožek, J. Vítek. Během kursů bude uspořádána řada výletů do Vysokých Tater, Demanovských jeskyň aj.

E. S.

ROZLOUČENÍ

Všem je teď smutno. Přichází konec.

Rej krůpějí bubnuje divoký tanec,
samo nebe pláče, slzou se zalyká,
jezero se chvěje a bolestí vzdychá.

Zamyšlen do okénka hledím,
na srdci smutku strunu ladím.
však přece v kalu smutku zdá se mi,
že příroda nám chce ulehčit těžké chvíle loučení.


To tam slunka kouzlo, i les už nevoní,
snad brzy na vrata roku chmurná jeseň zazvoní.
Vím, chceš, aby jak u nás ráno
na všechny se slunko smálo.
Neříkej, že je nás málo!

Však všechny pojí idea –
by každá bytost na světě šťastný život měla.
To chce celý dobrý lid. A chceš-li zajistiti světu klid,
bojuj: za mír, za vlast, za socialismus!

F. J. Kubišta

Vysázeno 8.8.1952 ve 13.20 hodin.

Redakce upřímně děkuje všem spolupracovníkům!



Ĉu la interesaj vizaĝoj estas al vi konataj?



Verda Voĉo de Poprad



No 1

12.8.1952

ESPERANTO-LINGVO VIVA

Kiel ofte oni aŭdas diskuti – kaj, bedaŭrinde - eĉ disputi pri tio, ĉu esperanto estas viva lingvo, ĉu oni povas ĝin uzadi praktike, ĉu ĝi ne estas nur "morte naskita infano". Sed ĝuste en la du semajnoj, pasigitaj en Poprad en la rondo familia ni absolute sendube konsciiĝas pri tio, ke esperanto estas viva kaj vivanta lingvo. Estas io varme sekura kaj kontentiga en la fakto, ke ĉiujare en la regione de Tatroj ekkantas la verda lingvo sian amkanton al la vivo, paco kaj homaro. Ĉar esperanto vere estas lingvo de amo, de granda amo al homoj, iru tra la stratoj de Poprad, ĉie sonas tiu amlingvo, ĉie ĝi kantas sian saluton al la vivo, ĉie ĝi murmuras en amika babilado. Kiom da kontentigo donas al ni esperantistoj la fakto, ke oni vere parolas, uzas nian lingvon! Kaj kiel necesas vere ĝin paroli - esperanto ja estas viva, ĝi kapablas ĝoji, ridi, kanti kaj plori. Provu ankaŭ vi, karaj, vi, kiuj ankoraŭ timas paroli. Nia unua devo estas ja konvinkigi homojn pri tio, ke esperanto estas uzata kaj tion ni sukcesos nur parolante ĉie nian belan lingvon. Dum grandaj mondkongresoj oni parolas nur verde - ĉu ankaŭ tie ĉi ni ne estas kvazaŭ alvenintaj al tute malgranda kongreseto – ĉu ni ne venis por senti fratecon en koroj lacaj kaj sopirantaj je varma homa sento? Egale, ĉu ni estas ĉeĥoj, slovakoj, hungaroj - ni ja havas unu komunan lingvon. Komenciĝu pri tiu ebriiga fakto, pri tiu kapturige ĝoja fakto, ke ni ĉiuj komprenas, povas kompreni unu al la alia, eĉ se ĉiu el ni estas alveninta el alia anguleto de la vasta mondo!

Fratoj, amikoj, samideanoj, ni parolu en Poprad nur esperante!

E.Sch.

KRONIKO

Jam sabatvespere per diversaj trajnoj sporade alvenadis partoprenantoj de nunjara Somera Kolegio de Esperanto en Poprad. Sed pleje ili alvenis dum la antaŭtagmezaj horoj dimanĉe kaj la prepara komitato funkcia en la stacidomo devis rapide kaj por ĉiu kontentige solvi ĉiujn personajn kaj ceterajn problemojn. Estas klare, ke nia junularo solvis tiun taskon eminente. Dum la posttagmezo jam ĉiu povis ordigi siajn aferojn kaj purigi sian korpon en sia provizora respektiva hejmo.

Antaŭvespere la instruistaro de la Kolegio konferencis kaj pridiskutis ĉiujn gravaĵojn rilate al la glata funkcio de la kursoj. Je la 19a h kolektigitaj gesamideanoj en bona humoro entreprenis

duonhoran promenon por atingi la salonon de interkonatiĝa vespero en Spišská Sobota. Unu horon pli poste en bele ornamita salono komencis solena malfermo de la Kolegio. Post la bonvenigaj vortoj de sam. Slivko, estro de loka junalara grupo, sam. Zvara prezentis al ĉiuj la instruistojn kaj ceterajn kunhelpantojn. Komuna danco certe estis la plej taŭga rimedo por interkonatiĝi. Same plaĉe estis akceptitaj la ceteraj programeroj. Nur malvolonte ni ĉiuj revenadis po grupoj hejmen. Sed matena laboro nin atendis.

Post la unua komuna matenmanĝo ĉiuj foriris en lernejon en Velká kaj komenciĝis tie la instruado. La kronikisto en la kursoj ABC konstatis la plej bonan volon kaj de la lernantoj kaj la instruistaro. Dum la ĉefa paŭzo la partoprenantoj estis fotografitaj.

Posttagmeze estis komuna trarigardo de Poprad kaj la vespero por ĉiu liberprograma.

Vi

Gruzina popolkanto.

Kie, karulin', kuŝas vi?
Vian tombon ja serĉas mi.
[:Koro mia doloras tro.
Kie estas vi, Suliko?:]

Rozon vidas mia okul',
Sur ĝi roso kvazaŭ spegul'.
[:Ĉu ne dormas vi sub la roz'
En eterna dolĉa ripoz'?:]

Ĉe la roz' sur verda arbet'
Najtingalo kantas kantet'.
[:Ĉu proksime vi estas, ho,
Ĉu en malproksim', Suliko?:]

Sub la roz' nun sidas birdet',
Alten sonas ĝia kantet',
[:Kvazaŭ dirus ĝi: "Aŭdu do,
Ĉi ja estas mi Suliko!:]

Trad. A.K.

PROGRAMO

Útorok: hned' po vyučování žiaci sa poponáhľajú na obed, lebo o 13,22 h odchádza električka zpred stanici do St.Smokovca. Ztadiel' pozemnou lanovkou sa pojde na Hrebienok. Návrat normálne k večeri a večer volno a príprava na stredu.

Streda: celodenný výlet na Štrbské pleso, Popradské pleso, Rysy, Ostervu, Batlzovské pleso podľa dispozic v škole.

Štvrtok: odpoľudnia kúpanie, večer o 19,30 h v sále soznamovacieho večierku prednáška na tému: "Oslo - nunjara ĉefurbo de Esperantujo". Prednáša Jozef Vitek. Piatok: odpoľudnia návšteva Tatranskej Lomnice podľa dispozic v škole.

Ĝoje ni konstatas, ke ano de nia Kolegio estas ankaŭ nederlanda samideano Car de Waart, kiu per siaj salutvortoj okaze de nia interkonatiga vespero akiris simpatiojn de ni ĉiuj. Ni forte esperas, ke li sentas sin hejme sub niaj Tatroj.



Ankaŭ ĝojiga surprizo per ĉiuj estis la ĉeesto de slovaka esper. pioniro sam. A. Kremmer el Košice. Sen li certe nia unua vespero ne estus tiel amikeca.

Niaj gesamideanoj montris al ni belan ekzemplon de entuziasmo. La grupo el Svit dimanĉvespere devus sufiĉe frue forlasi nian vesperan programon, ĉar la vagonaroj ne atendas. Sed la programo tiel ravigis ilin, ke ili tutsimple restis kaj uzis noktomezan rapidvagonaron paginte rapidvagonaran alpagon nur por la distance de 7 km!

Kontribuu vi ĉiuj al la enhavo de nia gazeto. Dependas de vi ĉu ĝi estos riĉenhava kaj bonkvalita. Viaj spertoj, travivaĵoj, opinioj kaj konkludoj eble interesas ĉiujn... tial skribu al la redakcio!

SPRITAĴOJ

Du malnovaj konataj ŝtelistoj trafis sin survoje. La unua demandis la alian: "Kiel longe vi jam ne ŝtelis?"

La dua: "Entute dum tri lastaj tagoj".

La unua do mirinde: "Ĉu vi eble pro via bona konduto volas fariĝi la vilaĝestro?"

En kiu monato naskiĝas en nia lando plej multaj infanoj?

(Respondo en la proksima numero).

KLACĜEMA OBSERVANTO

Esperantistĉe jsou nĉrodem vynalĉzavĉym. Nejlepšĉi dĉkzak o tom podĉvĉvĉ Hanako, kterĉy po nastoupenĉi do pĉeplnĉnĉho rychlĉiku nijak neztratil svou duševnĉi rovnovĉhu. Mĉsto obvyklĉ kolibĉřĉi foukacĉi harmoniky vytĉhl pĉřiručnĉho zavazadla desku menšĉich rozmĉřĉ, a pomocĉi pĉedem pĉipravenĉy provazcĉ obratnĉ ĉi zavĉsil na zařĉzení vozu a mezi provazce vsunul ruce i hlavu a za chvilku mohutnĉm chrĉpĉnĉm pĉesvĉdĉil spolucestujĉcĉi, že jeho spĉnek ve stoje je stejnĉ vydatnĉy jako v dobrĉe hanĉckĉ posteli. Veškerĉ pokusy zabrĉnit jeho chrĉpĉnĉ zĉstaly bezvĉslednĉ. Jen tak se stalo, že rychlĉik dojel do Popradu s tĉmĉř hodinovĉm zpoždĉnĉm, i kdĉž oživovacĉ pokusy spolujedoucĉich samideĉnĉ byly zahĉjeny uŹ v Mikulĉši.

Mnohĉ samideĉnĉi dnes zvedavĉm zrakom si obzerali nĉšho redaktora a jeho spolupracovnĉka. Noako sa ĉm nepĉĉili. Nie je to div! Veď obaja spia v posteliach, kde matrace sĉ v prostriedku tak vylezenĉ, že len krajnĉ Źnava ĉm dovolila spĉnek. Je otĉzka, ako budu vyzerat' ĉch kostry na druhĉ tĉždeň.

Ĉefo de nia Verda vendejo en zorgoj. Dimanĉe nia konata samideano Pytloun vane cerbumis kiel eblas, ke liaj kofroj ankoraŭ ne alvenis en Poprad, kvankam li alsendis ilin pli frue el Doksy, ol tiuj samideanoj, kies kofroj jam estis tie ĉi. Lia grizaspekta zorgoplena vizaĝo iom heliĝis noktomeze, kiam atingis lin la sciigo, ke la sopirataj valizoj feliĉe estas en Poprad. Tutan lundon li dediĉis al ordigo de sia vendejĉambro kaj nuntempe li jam regas pipfumante en sia vendejo, kontentigante dezirojn de sia vasta klientaro.

Ĉu vi ŝatmanĝas kuniklojn? En la jesa okazo, turnu vin al sam. Ŝpŭr, kies provizo estas neelĉerpebla.

PROVERBOJ (laŭ Zamenhof)

Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras. Pekinto pentas, kolero silentas. Ne karesu per mano, sed karesu per pano. Pri la ŝtrumpa truo, scias nur la ŝuo. En landoj transmaraj estas oraj arbaroj. Mizero faras viziton, ne atendante inviton. Forveturis malsaĝa, revenis nur pli aĝa. Ne demandu scienculon, demandu spertulon. Al la papero ne mankas tolero.

ESPERANTISTA SENTENCO

Ne tiu estas bona esperantisto, kiu bone esperas, sed kiu ebligas bonan esperon.

ANONCOJ

Por povi partopreni niajn ekskursojn mi aĉetos bonajn gumpŝuojn, numeron 52! Signo: "Vaganta nederlandano"

Kupim slaninu, oŝtiepok alebo klbásku! Znaĉka: "Väčší záujem ako o esperanto".

Redakĉná uzávierka vždy o 11. hod.

Toto ĉíslo bole ukonĉené 11.8.52 o 17,30 hod.

Verda Voĉo de Poprad



No 2

POPRAD

14-8-1952

LA DEVIZO DE VERDA STANDARDO

La kreinto de nia lingvo deklaris en sia parolo en la tria Universala kongreso 1907 jenan konfeson pri nia verda standardo:

Ni Esperantistoj-batalantoj certe vidas en nia standardo, ke ĝi estas por ni io sankta, ĝi estas la signo, sub kiu ni marŝas al nia paca batalado, ĝi estas la voĉo, kiu konstante menorigas al ni, ke ni laboras por Esperanto nur tial, ĉar ni esperas, ke pli aŭ malpli frue, eble post multaj jarcentoj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.

Ni konstante ripetadis, ke ni tute ne deziras nin enmiksi en la internan vivon de la gentoj, sed ni deziras nur krei ligantan ponton inter la gentoj. La devizo de la ideaj esperantistoj, neniam ĝis nun precize formulita, sed ĉiam klare sentata, estas:

"Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn."

Tia, laŭ mia opinio, estas la devizo de la verda standardo, de tiu bela kaj majesta standardo, kiu kunvokas nin ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo en la nomo de la plej bela revo de la homaro.

-jelĉ-


Forte ni staru, fratoj amataj,
por nia sankta afero!
ni bataladu kune tenataj
per unu bela espero!

Regas ankoraŭ nokto sen lumo,
la mondo dormas obstine,
sed jam leviĝos baldaŭ la suno,
por lumi, brili senfine.

(El "Al la fratoj" de L. L. Zamenhof)

KRONIKO

Mardan antaŭtagmezon la 12-8-1952 travivis la kolegio en bona laboro. Dum la ĉefa paŭzo estis komuna fotografado per la plej moderna fotografilo de nia fervora s-ano Milan Zvara kaj jam vespere ni ĉiuj povis kritike observi belaspektajn vizaĝojn de niaj kolegianoj kaj -inoj. Posttagmeze estis dediĉita al la unua "oficiala" ekskurso en la montaregon. La ŝnurfervojo ascendportis ĉiujn al Hrebienok, do kie po grupoj ni vizitis Kamzík, akvofalojn aŭ Skalnaté pleso. Belege travivita posttagmezo.



Libera merkredo estas plene rezervita por la tuttaga vizito de Altaj Tatroj. Komuno ni trajne atingis Štrbské pleso kaj de tie promene Popradské pleso. Post formanĝo de ekskurstagmanĝo (lardo, verda papriko kaj pano) ni grupiĝis en tri grupojn. La unua celis kaj dum la tago ankaŭ atingis Ŝabie pleso kaj Rysy (2503m alteco), la dua Osterva (1934m alteco), Batizevské pleso, Sliezsky dom kaj la tria celis trarigardi la ĉirkaŭaĵon de Popradské pleso. Dum la vespero ĉiuj laciĝitaj kun feliĉa rido en siaj vizaĝoj revenis sen akcidento hejmen kaj jaŭde antaŭtagmeze kolektiĝis komplete en siaj respektivaj klasoj. Tiel la gekolegianoj atestas, ke ili alvenis en Poprad ne nur per partopreni belajn, bone organizitajn ekskursojn, sed samtempe por alĉerpi novajn sciojn en la verda lingvo.

VI

NOVAĴOJ

D-ro A. P i t l í k festas sian 50-jaran esperantistan jubileon.

En aŭgusto antaŭ 50 jaroj, kiel gimnaziano, esperantiĝis nia direktoro D-ro Augustin Pitlík. Liaj meritoj estas mondkonataj kaj ni nur asertas lin pri nia granda admiro al lia persono kaj verko.

Li daŭre restu sana kaj juna por nia esperantistaro!

Ĉeĥa esperantistino kaj la Universala Kongreso.

Eli Urbanová, bone konata esperantista poetistino, en la internacia konkurso de esperantistaj poetoj, okazinta en la kadro de la ĵus finita 37a UK en Oslo, akiris per siaj poemoj IIan kaj VIIIan premion.

Ni sincere gratulas al la sukceso de nia sinpatia samideanino!

Japanujo.

En pli ol 30 universitatoj kaj 50 mezgradaj lernejoj troviĝas esperantistaj grupoj.

PROGRAMO

Piatok: vylet do Tatranskéj Lomnice. Odchod z Popradu elektriĉkou v 13.22 hod. prestúpit' v Staron Smokovci. Jazdenky zakúpit' v Poprade do Tatranskej Lomnice. Odchod z Lomnice vlakom (nie elektriĉkou) v 18,40 h. Presadať v Studenom Potoku. Prichod do Popradu v 19.36 hod.

Sobota: po obede oddych, večer nacvičovanie piesní od 19.30 hod. v sále v Spišskej Sobote. Texty "La Espero" so sebou!

NedeĤa: celodenný vylet do Slovenského raja. Odchod v 5.33 hod vlakom I. skupina do Vydriku, II. skupina do Letanoviec, III. skupina do Tomašoviec, IV. skupina do Smižan. Každý si zakúpi jazdenku podlá svojej skupiny. Nazpet nastupujú všetky skupiny v Tomašovciach na vlak v 18,16 hod. Podrobné informácie v škole!

ESPERANTO EN UNESCO

En aprilo la Eduka, Scienca kaj Kultura organizo de UN decidis enmeti inter la projektojn pridecidotajn el la Ĝenerala Kunveno, kiu okazos en Parizo en novembro, la jenan:

"La Ĝenerala direktanto rajtas studi la problemojn pri la intelektaj kaj moralaj interrilatoj inter la popoloj de diversaj lingvoj, kaj la metodojn por helpi solvon de tiuj problemoj."

Samtempe UN, en la dekumentaro pri la decidota programo, mencias petskribon pri esperanto subskribitan de pli ol 800.000 persenoj kaj aprobita de organizoj kun pli ol 15.000.000 membroj. La petskribo estis prezentata al UN en aŭgusto 1950.

Tial la kunveno de Parizo estos grava por ĉiu, kiu kredas, ke esperanto estas plena solvo de la lingva diverseco. La klopodoj persvadi la Ligon de Nacioj subteni esperanton rezultigis valoran raporton pri la instruado de esperanto, laŭ kiu multaj registaroj permesis esperantajn klasojn en la lernejoj. La eldonado de bultenoj en esperanto per la Internacia Labora Organizo estis grava rekono kaj ekzemplo. Estus granda antaŭenigo por esperanto se UN decidus tiun ĉi studon. Valoras do, ke la samideanoj klopodis pri la petskribo al UN. Se ni forlasos la okazon, estos vana la fidela laboro de dekmiloj da entuziasmoj, kiuj kolektis la subskribojn.

Por atingi la celon, ke UN en Parizo decidu entrepreni la studadon, estas necesege, ke oni rapidu kaj profitu el nia sperto pri la petskribo.

Jam preskaŭ tri jaroj pasis de kiam reprezentantoj de UEA prezentis la petskribon al la Ĝenerala Helpsekretario en la ĉefsidejo de UN. Nun tamen ĝi sidas nur en la kategorio B, kaj ĝi realiĝos nur se estos sufiĉe da mono post la fino de aliaj "pli gravaj" projektoj. Spite al energia agado de s. Durand, la komisiito de UEA por Unesco-aferoj, kaj la esperantistoj de la pariza regiono, la afero malrapide progresas, ĉar UN estas aro de registaroj. La sekretario, ĉu de UN ĉu de Unesco ne rajtas iniciati eĉ studadon sen aprobo de la plimulto de la membro-ŝtatoj. Pro tio estas necese, ke la registaroj instrukciu siajn reprezentantojn, kiuj ĉeestos la kunvenon en Parizo, subteni la studadon kaj proponi, ke ĝi estu movata de la kategorio B en la aktualan programon.

Sekvas, ke ĉiu nacia asocio kaj ĉiu individua esperantisto influu sian registaron - la ministron de eksterlandaj aferoj, la ministrojn de kulturaj kaj edukaj aferoj, la oficistojn en la departementoj k.t.p. Nur per organizita klopodo ni povas sukcesi.

(Laŭ sciigo de Aŭstralia Esperanto-Asocio)

KLAĈEMA OBSERVANTO

Marde matene en lernejon veturanta verdstela lernanto salutis la aliajn per "Bonan vesperon". Kvankam ni scias, ke li estas nur unutaga komencanto, havanta plej bonan volon, tamen ni rekomendas uzi tiujn kutimajn belegajn salutojn konforme al respektiva tagodivido, ĉar estus malkonvene ekz. venanto al la matenmanĝo saluti ĉiujn per "Bonan nokton", kvankam kelkaj ankoraŭ duondormetas pro la dumnokta studado!?!

Náš riaditel kolegia, slavný cestovatel, zablúdil, keď sa vracal z večierku. Hoci sa snažil z plných sil rozpomenúť sa na Poprad z dob pred 30 rokmi, nič mu nepomohlo skoro si pripomenúť správnu cestu a keď jeho sverenci už dávno spokojne spali, jeho domáci marne premýšľal, kde sa túla jeho podnájomník, budiaci inak dojom slušného, staršieho pokojného človeka. Len v ranných hodinách, celkom ustatý, zvonil hore menovaný na svojho domáceho a snažil sa potom chytro dospať čo premeškal. Konstatujeme z tejto skutočnosti, že aj poctivo vyzerajúca tvár môže mýliť!

Pri včerajšem výstupe na Rysy sa poobzerali a jeden z nich konštatuje. "Vyššie to už asi nepôjde."

El la Verda vendejo.

Post vanaj informoj por prizorgi refreŝigan nutraĵon al niaj gekursanoj, mi kun ĝojo eksciis, ke estas riceveblaj bakitaj kunikloj. Do, karaj gesanideanoj, tuj kiam s. Ŝpŭr liveros kontentigan kvanton, mi komencos per la distribuado al la malsataj. Bonega afero. Py

Skupinka posluchačů na výletě v Tatrách, vedená s. Šolcem, rychlým pochodem přesně na minutu splnila program, a vrátila se do Popradu v 21 hodin. Ve skupině velmi čile si vedl známý abiturient koleje Hanako. Dokázal, že mladým stačí tempem. Od Skalnatého plesa byl však pohřešován. Domníváme se, že neodolal a dal se do služeb tamní hvězdárny. Dodáváme, že dalekohledem opatřený byl a že alespoň na dálku sledoval odjezd posledního vlaku z Lomnice.

ANONCOJ

Rád sa soznámim s uprímnuu samideánkou, ktorá by mala záujem o každodenné kúpanie v Batizovskom plese. V odmenu esperantská konverzácia. Zn. "Dumviva komencanto".

Z REDAKCIE

Redakcia bohato odmení všetky príspevky zo života kolegia, ktoré bu- nečitelné o 14,45 hod.